

Ora Ĵurnalo

Numero 59, Februaro 2023



Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	Momentaj temploj.....	11
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	La plej malnova runŝtono malkovrita – Världens äldsta runsten upptäckt.....	13
Espeporko meditas.....	3	El sat.iro	14
Novaj vortoj dum 2022 en la sveda	3	La numenio – Storspoven	15
Långedrag.....	4	Printempaj hajkoj.....	15
La memortago de la Holokaŭsto, la 27a de januaro	4	Mia vojaĝo al Senegalo	16
La 6an de februaro – la nacia tago de la sameoj		Esperanta kastelo Greziljono dum printempo 2023!.....	23
6 februari – samernas nationaldag	5	Kleopatro	24
La ŝafoj ne volas aktori.....	5	Fama piedpilkisto rekomendas Esperanton.....	27
Por altigi la statuson de katoj nova sveda leĝo postulas registradon de katoj.....	6	Aŭskultu Esperanto-kantojn – kaj kunkantu!	29
Klimatzorgo de asocioj en Svedio	7	Aŭskultu prezentadon pri Lorenaj Fabeloj!	29
Pli pri la klimato – Greta Thunberg kun samideanoj.....	8	Interŝanĝo de libroj.....	30
La klimatgrupo de Alingsås estas parto de la movado Fridays For Future – Alingsås klimatgrupp är en del av rörelsen Fridays For Future	9	Akompanu Ragnhild Hallén dum ŝi vagas en Linnéstaden – Följ med Ragnhild Hallén när hon vandrar i Linnéstaden.....	31
En Lycksele, urbo en la plej norda parto de Svedio, Monika Thelin trikas "la veteran jaron", raportis la sveda TV	11		

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79,
siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32,
ingegerd.granat@gmail.com. Fina paĝaranĝo:
Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.





Espeporko meditas



- **Temo por ĉi tiu numero estas la klimato.**

Kion faras ekzemple la ŝakklubo aŭ la Esperanta klubo por la klimato? Kaj kial la Klimatgrupo en Alingsås metis amason da ŝuoj sur la Grandan placon? Bv. legi!

- **Walter Klag el Aŭstrio**, daŭre instruas nin en Nordio pri nia historio.

Ĉi tiun fojon temas pri la plej malnova runŝtono, trovita en Norvegio. Dankon al Walter! Ni eble devus nomi vin "Honora civitano de Nordio"!

- Sciu, kion la iama futbalisto **Pelé el Brazilo diris pri Esperanto!**

- En la Zamenhofa tago de Vieno, **Espoir** pro teknikaj kialoj maltrafis paroli pri sia vojaĝo de DR Kongo al la **oka afrika kongreso de Senegalo**. Nun vi povas legi ĝin en Ora Ĵurnalo.

- Ĉu vi pensas ke Kristnasko estas tro malnova afero nun? Tute ne! La artikolo

de Elwira el Gdansko, povas vekti debaton pri **la traktado de bestoj**.

- **Gotenburgo estas temo en ĉiu Ora Ĵurnalo**. Ĉi tiun jaron estas tre grave, ĉar Gotenburgo en 2023 celebras la 400-jaran jubileon de sia estiĝo – du jarojn pli malfrue pro la pandemio. Vi povus celebri kun ni, se vi venos **al nia somera kurso 19–22 de junio**. Se vi povus kunpreni po unu komencanto – ni ĝojus. La pasintan jaron estis 21 partoprenantoj, sed eĉ ne unu komencanto.

- La ĉiujara **Filmfestivalo de Gotenburgo** okazis en februaro. Tamen mi estis tro okupita por havi tempon viziti ĝin, bedaŭrinde, ĉar estas okazo vidi filmojn de multaj landoj kun diversaj temoj. Mi atendas artikolon pri ĝi en 2024! Kiu volus skribi?

- Do, **ni provu trovi komencantojn kaj ni gardu la klimaton**. Eble du novjaraj promesoj! Sukcesoj! /Siv

Novaj vortoj dum 2022 en la sveda

La instituto de lingvo kaj folkloraj memoraĵoj ĉiujare eldonas liston de novaj svedaj vortoj. Jen kelkaj el la jaro 2022:

Brösta – "brusti" = preni respondecon pri, preni malfacilan taskon.

Dödsdoula – mortsubtenulo = profesia konsilisto kaj subtena persono ĉe la vivofino.

Hungersten – malsatŝtono = gravurita roko, kiu ordinare troviĝas profunde sub la akvosurfaco, sed iĝas videbla dum sekecego kaj malaltaj akvoniveletoj. Ĝia teksto temas

pri la malsato pro la sekecego.

Klimatbiljett – klimatbileto = subvenciita sezonbileto por publika transporto kun la celo redukti la poluadon de motorveturiloj.

Urbexare – urbesploristo = persono kiu esploras frolasitajn konstruaĵojn kaj lokojn.

Virtuellt stängsel – virtuala barilo = signal-kolumo kun GPS, kiu registras la pozicion de la besto kaj avertas ĝin, se ĝi estas proksime al la limo de senbarila paŝtejo.

El listo kompilita de Inga Johansson

Långedrag

konekse kun la bildo sur la unua paĝo –
i samband med bilden på första sidan



Långedrag estas nun parto de Gotenburgo.

La nomo Långedrag estas trovita por la unua fojo en 1766 kaj tiam rilatis al salejo kaj fiŝkaptista vilaĝo. La signifo de *Långe*- celas "la longan, vent-senŝirman velitineron de Västerberget" kaj *-drag* signifas "malferman ventan akvon".

La granda haringa fiŝkaptado ĉe la fino de la 18-a jarcento kontribuis al la evoluo de Långedrag kaj la konstruado de vojo al Gotenburgo. La vojo iĝis grava itinero, precipe dum severaj vintroj kiam la fjordo kaj la rivero estis fermitaj per glacio.

Meze de la 19-a jarcento, la vaporŝipo Delphin komencis fari regulajn tagekskursojn kun bangastoj al Långedrag. Malvarmaj banejoj kun apartaj sekcioj por viroj kaj virinoj kaj restoracio estis konstruitaj.

Terpecoj komencis esti parceligitaj por somera loĝado kaj baldaŭ ankaŭ por tutjara loĝado.

Långedrag är nu en del av Göteborg.

Namnet Långedrag påträffas första gången år 1766 och avsåg då ett salteri och ett fiskeläge. Innebörden av namnet anses komma av "den långa, för vinden utsatta segelleden utanför Västerberget" (Långe-) och "öppet vatten där vinden ligger på" (-drag).

Den stora sillruschen i slutet av 1700-talet bidrog till utvecklingen av Långedrag och att en väg anlades till Göteborg. Vägen blev en viktig led speciellt under svåra vintrar då fjorden och älven var stängda av is.

I mitten av 1800-talet började ångbåten Delphin göra regelbundna dagsresor med badgäster till Långedrag. Kallbadhus med separata avdelningar för herrar och damer och en restaurang byggdes.

Tomter började avstyckas för sommarboende och ganska snart också för åretruntboende.

La memortago de la Holokaŭsto, la 27a de januaro

Holokaŭsta Memortago. La 27-an de januaro homoj en la tuta mondo kunvenas en ĉiujara manifestado. Ĝi estas la Internacia Tago de Memoro pri la Viktimoj de la Holokaŭsto – la sama dato kiam la ekstermkoncentrejo Auschwitz-

Förintelsens minnesdag.

Den 27 januari samlas människor över hela världen i en årlig manifestation. Det är den internationella minnesdagen för Förintelsens offer – samma datum som



Birkenau estis liberigita en 1945. En 2023 ĝi estas okazinta antaŭ 78 jaroj. En 2005 UN deklaris ĉi tiun tagon kiel Internacian Tagon de Memoro.

förintelselägret Auschwitz-Birkenau befriades 1945. År 2023 är det 78 år sedan. År 2005 deklarerade FN denna dag som internationell minnesdag.

La 6an de februaro – la nacia tago de la sameoj

6 februari – samernas nationaldag



La 6-a de februaro estas la samea nacia tago kaj ĝi estas festata ĉie en Sápmi (Sameio).

La unua festo okazis lige kun la lanĉo de la Internacia jaro de indiĝenaj popoloj de UN en 1993 en Jokkmokk. Sameoj troviĝas en Norvegio, Svedio, Finnlando kaj Rusio.

La nombro da boacpaŝtistoj malpliĝas. En Svedio, la plej granda nombro da sameoj nun troviĝas en Stokholmo kaj Gotenburgo.

Proksime de Gotenburgo, la samea asocio konstruis vintran kabanon ĉe bela lago.

Den 6 februari är det samernas nationaldag och den firas över hela Sápmi.

Det första firandet skedde i samband med inledandet av FN:s internationella urbefolkningsår 1993 i Jokkmokk.

Samer finns i Norge, Sverige, Finland och Ryssland.

Antalet renskötande samer minskar. I Sverige finns nu största antalet samer i Stockholm och Göteborg.

I närheten av Göteborg har sameföreningen byggt en vinterkåta vid en vacker sjö.

La ŝafoj ne volas aktori

Elwira Twardowska el Gdansko salutas la gotenburganojn, kiujn ŝi renkontis kaj dum la somera kurso en Gotenburgo 2018 kaj ĉe Esperanto sur la strando en Gdansko en septembro, la saman jaron.

Iam mi sendis al ŝi bildojn pri la Sankta familio kun vivantaj roluloj – Jozefo, Maria, Kristo – sed kun artefaritaj ŝafoj.

En Gdansko la ŝafoj vivis, sed malvolonte aktoris, dezirante hejmenveni al la ŝafejo.





Elwira aldonas ĉi tiujn pensojn:

La fotoj estis faritaj dum procesio de Tri Reĝoj, tiel ni nomas Epifanion. En Pollando Epifanio estas senlabora festa tago.

Mi pensas, ke problemo pri la traktado de bestoj estas tro granda por kunigi ĝin kun tiu evento. Mi kaj multaj poloj tre serioze pensas pri la sorto de ĉiuj bestoj. Multaj de miaj konatoj jam ne manĝas viandon. Estas granda problemo kun libere vivantaj aproj, alkoj

cervoj kaj aliaj, kiuj venas urben por trovi manĝon. Kompatindaj erinacoj, kiuj ofte sensukcese provas trapasi straton kaj mortas sub aŭtomobiloj.

La granda tragedio de venenitaj fiŝoj en la pola rivero Odra ĉi-somere – neniu sentas sin kulpa. Ĉiutage eblas aŭdi pri similaj katastrofoj en la tuta mondo.

/Elwira

Por altigi la statuson de katoj nova sveda leĝo postulas registradon de katoj



Djurens Vänner Riksorganisation – La tutlanda organizo de la Bestamikoj informas pri nova leĝo koncerne katojn:

Je la jarŝanĝo ekvalidis nova leĝo pri deviga markado kaj registrado de katoj kaj hodiaŭ malfermiĝas la nova kata registro de la Sveda agrikultura agentejo.

La leĝo, ke ĉiuj katoj devas esti identigitaj kaj registritaj en la katregistro de la Sveda agentejo por agrikulturo, validas por ĉiuj katoj naskitaj en 2008 kaj poste, eĉ tiuj, kiuj jam estas registritaj en aliaj registroj.

Memoru, ke katoj registritaj en aliaj registroj **ne** estas aŭtomate translokitaj al la nova registro, sed devas esti reenigitaj. /Siv

Klimatzorgo de asocioj en Svedio



Roger Nilsson vidis, ke la Sveda ŝaka federacio faras reklamadon por la klimato. Ĉu estas io por Esperanto, li demandas?

1. Penu plenumi la naciajn svedajn klimatajn celojn.
2. Atentu klimatajn konsiderojn dum vojaĝado (publika transporto aŭ aŭtoveturado).
3. Klimata kompenso por la aviadoj ne evitindaj.
4. Se eble, havu kontrakton kun verda elektroliveranto.
5. Ordigi rubaĵojn se eble kaj evitu foruzeblajn objektojn.
6. Petu klimat-amikajn alternativojn kiam vi aĉetas varojn.
7. Se eble, prunteprenu kaj pruntedonu materialon al aliaj asocioj.
8. Ĉiujare sekvu la klimatlaboron de la asocio.

Do, kiel ni apliku la postulojn al nia esperantoklubo en Gotenburgo? La deirpunkto estos la 8 punktoj de la ŝakfederacio.

Punkto 1: Komprenoble ni strebas plenumi la naciajn svedajn klimatajn celojn.



Punkto 2: Tiuj, kiuj loĝas en bicikla distanco de nia kursejo, biciklas. La aliaj vojaĝas per buso aŭ tramo.



Tiuj, kiuj plej multe zorgas pri la klimato restas en la lito kune kun sia hejmbesto.



La 3an kaj la 4an punktojn ni lasu al nia kunlaboranto – la studorganizo Vuxenskolan.

La 5a punkto: Ni vestu nin per varmaj puloveroj por elteni pli malaltan temperaturon en la klasĉambroj. Ni evitu uzi foruzeblajn objektojn, kiel paperajn tasojn. Ni krome ŝparas varman akvon, kiam ni ne devas purigi la tasojn.



Punkto 6: Ĉiu kunprenas fruktojn por la paŭzo. Kelkaj elektas svedajn pomojn. Aliaj elektas bananojn, kiuj estas transportitaj de grandaj ŝipoj, kiuj poluigas la marojn. Ni rekomendas: kunprenu sveddevenan karoton anstataŭ bananon. Pri kafo ni ne plu pensas.



Ni elektu ĉambrojn kun potplantoj, kiuj donas al ni oksigenon.



Punkto 7: Jes, ni volonte pruntedonus esperantajn librojn al asocioj – sed ĝis nun neniu asocio volas havi tion – krom esperanto-asocioj. /Siv

Pli pri la klimato – Greta Thunberg kun samideanoj



Ça suffit!

Décennie après décennie, les PDG du gaz et du pétrole trompent le grand public sur l'impact des énergies fossiles qui font surchauffer la planète. Et pourtant, sous nos yeux, la forêt brûle, les inondations et les sécheresses tuent.

Ces PDG seront présents cette année encore au sommet économique de Davos, en Suisse. Ils prétendront se soucier de la planète... Tout en continuant de lancer de nouveaux forages et d'engranger des milliards.

Nous allons nous aussi nous rendre en Suisse et leur remettre une lettre de mise en demeure pour les pousser à abandonner les nouveaux projets de forage. Soyons des millions à leur dire que nous voyons clair dans leurs mensonges.

Mmes et MM. les PDG des ultinationales des énergies fossiles,

Nous vous mettons en demeure d'arrêter immédiatement l'ouverture de nouveaux sites d'extraction de pétrole, de gaz ou de charbon

Jam sufiĉas!

Jardeko post jardeko, agantaj direktoroj de gasaj kaj petrolaj entreprenoj trompas la ĝeneralan publikon pri la efiko de fosiliaj brulaĵoj, kiuj trovarmigas la planedon. Kaj tamen, antaŭ niaj okuloj, la arbaro brulas, la inundoj kaj sekecoj mortigas.

Ĉi tiuj ĉefoficistoj ĉeestos denove ĉi-jare ĉe la ekonomia pintkunveno en Davos, Svislando. Ili pretendas zorgi pri la planedo... daŭrigante lanĉi novan boradon kaj rikolti miliardojn.

Ni ankaŭ iros al Svislando kaj donos al ili leteron de formala avizo por instigi ilin forlasi novajn borajn projektojn. Ni estu milionoj por diri al ili, ke ni travidas iliajn mensogojn.

Gesinjoroj ĉefoj de multnaciaj entreprenoj de fosiliaj brulaĵoj,

Ni atentigis vin tuj ĉesigi la malfermon de novaj nafto-ekstraktadejoj, gasaj aŭ karbaj, kaj

et de cesser de bloquer la transition vers les énergies propres don't nous avons toutes et tous besoin.

SAVAIENT depuis des dizaines d'années que les énergies fossiles sont à l'origine de changements climatiques catastrophiques ONT TROMPÉ le public et les investisseurs sur les évaluations scientifiques des risques climatiques ONT MENTI aux responsables politiques à l'aide d'informations visant à semer le doute et retarder les solutions.

Vous devez mettre fin à ces activités qui bafouent notre droit fondamental à un environnement propre, sain et durable et qui méprisent les droits des personnes autochtones.

Difficile de rester optimiste quand on voit que les catastrophes climatiques n'épargnent aucun continent – de la famine qui menace des millions de personnes en Afrique de l'Est à la destruction de la forêt amazonienne.

Face à cela, nous sommes notre plus grand espoir: nous sommes des millions à avoir l'envie de nous battre pour faire agir les responsables politiques et les dirigeants des grandes compagnies.

Il est temps de mettre ces PDG au pied du mur: en 2023, leur impunité est terminée. Mobilisons-nous, tous ensemble!

Sincèrement, Vanessa

ĉesu bloki la transiron al la puraj energioj, kiujn ni ĉiuj bezonas.

SCIANTE dum jardekoj, ke fosiliaj brulaĵoj kaŭzas katastrofan klimatan ŝanĝon.

TROMPANTE la publikon kaj investantojn pri sciencaj taksoj de klimata risko.

MENSOGANTE al politikistoj kun informoj celantaj semi dubon kaj prokrasti solvojn.

Vi devas ĉesigi ĉi tiujn agadojn, kiuj malobservas nian fundamentan rajton al pura, sana kaj daŭrigebla medio kaj kiuj malatentas la rajtojn de indiĝenaj homoj.

Estas malfacile resti optimisma, kiam ni vidas, ke klimataj katastrofoj ŝparas nenium kontinenton – de la malsato, kiu minacas milionojn da homoj en Orienta Afriko, ĝis la detruo de la Amazona pluvbaro.

Fronte al tio, ni estas nia plej granda espero: estas milionoj da ni, kiuj volas batali por ke la politikistoj kaj la estroj de grandaj kompanioj agu.

Estas tempo meti ĉi tiujn agantajn direktorojn antaŭ la muron: en 2023 ilia senpuneco estas finita.

Ni mobiliziĝu, ĉiuj kune!

Sincere, Vanessa

La klimatgrupo de Alingsås estas parto de la movado Fridays For Future – Alingsås klimatgrupp är en del av rörelsen Fridays For Future



*Jan Bondesson, unu el la membroj kun du el la afiŝoj: **Klimatkrizo nun, agu nun! Viv-esence – biologia multeco!***

*Jan Bondesson, en av medlemmarna, med två av plakaten: **Klimatkris nu, agera nu! Livsviktigt – biologisk mångfald!***

Jan diras: – Ni staras ĉe "Speaker's Corner" (Angulo de paroladistoj) sur la Malgranda placo, ĉiun vendredon inter 16:30 kaj 17:30 p.m.

– Ni disdonas materialojn, elmontras afiŝojn kun informo kaj diskutas klimatajn aferojn kun preterpasantoj, **aparte ni donas sugestojn pri kio ili mem povas fari.**

Nia celo estas disvastigi scion kaj engaĝigi homojn savi nian klimaton kaj nian medion.
Urgas!

Ni ankaŭ laboras kun konkretaj proponoj por la municipo de Alingsås **pliigi biologian diversecon kaj redukti ellason de karbondioksido.**

Kion la municipo povas fari

- Konstrui novajn biciklovojojn
- Arangî pli da bicikloparkadoj en la urbocentro
- Fari la urbocentron senaŭta
- Arangî senpagan publikan transporton por ĉiuj
- Certigi, ke estos elektraj busoj
- Aĉeti elektrajn aŭtojn
- Fari la proprajn transportojn pli efikaj
- Meti sunĉelojn sur ĉiujn urbajn tegmentojn
- Restaŭri drenitajn malsek-terenojn!

Jan sâger: – Vi stâr vid Speakers Corner, pâr lilla Torget, varje fredag mellan 16.30 och 17.30.

Vi delar ut material, visar upp plakat med information och diskuterar klimatfrågor med passerande, **inte minst ger tips om vad de själva kan göra.**

Vårt syfte är att sprida kunskap och få människor engagerade i att rädda vårt klimat och vår miljö. **Det är bråttom!**

Vi arbetar även med konkreta förslag för Alingsås kommun att **öka den biologiska mångfalden och minska utsläppen av koldioxid.**

Detta kan kommunen göra

- Bygga nya cykelbanor
- Ordna fler cykelparkeringar i centrum
- Göra stadens centrum bilfritt
- Ordna avgiftsfri kollektivtrafik för alla
- Se till att det blir eldrivna bussar
- Köpa eldrivna bilar
- Effektivisera de egna transportererna
- Sätta solceller på alla kommunala tak
- Återställa utdikade våtmarker, nu!

/Siv



Dum la pandemio, nur ok personoj rajtis kolektiĝi por manifestacii. Tiam oni kolektis ŝuojn, kiuj reprezentis imagitan grandan manifestacion. Jen bildo de la ŝuoj sur iu placo.

Under pandemin fick inte mer än åtta personer samlas för att demonstrera. Då samlade man ihop skor, som representerade en tänkt stor manifestation. Här är en bild på skorna på något torg.

En Lycksele, urbo en la plej norda parto de Svedio, Monika Thelin trikas "la veteran jaron", raportis la sveda TV



Ĉiun tagon Monika notas la temperaturon kaj trikas unu sinsekvan vicon.

Ju pli malvarma, ses pli malhela fadeno. Varmaj koloroj somere.

Jen la trikado de la temperaturo de 2022. /Siv



Estas multaj teorioj pri kiu aŭ kio faras agrolifojn. Kirlventoj, teraj energioj, eksterteranoj kaj homaj ĉarlatanoj por nomi nur kelkajn.

Kio igas la agrocirklotemon tiel fascina estas ke iu ajn, kaj ĉiuj, povas partopreni en la serĉado de respondoj. Tre interesa scienca laboro estis farita pri kultivaĵoj kaj grundoj el la rondoj, kiuj devus esti esploritaj de ĉiu interesita pri la fenomeno.

Jen ligilo al la specifa retejo pri tiu laboro: www.bltresearch.com. Proksimume same validas por la finfina signifo malantaŭ la ŝablonoj, estis iuj fascinaj esploroj pri la

Momentaj temploj

*Kion faras agrolifoj kaj kion ili signifas?
Vad gör grödcirklar och vad betyder de?*


Det finns många teorier om vem eller vad som gör grödcirklar. Virvelvindar, jordenergier, utomjordingar och mänskliga bluffmakare för att bara nämna några.

Det som gör odlingscirkelämnet så fascinerande är att vem som helst och alla kan delta i sökandet efter svar. Det har utförts ett mycket intressant vetenskapligt arbete om grödor och jordar från cirkelarna som bör undersökas av alla som är intresserade av fenomenet.

Du hittar en länk till den specifika webbplatsen om detta arbete: www.bltresearch.com. Ungefär samma sak gäller för den ultimata innebörden bakom

geometrio kaj matematiko de la desegnaĵoj kaj formoj de la agrocirklo, sugestante ke la ŝablonoj ne estas arbitraj aŭ sensencaj, sed tute male.

Homoj kunligis la cirklojn al temoj tiel diversaj, kiel stelkonstelacioj kaj kvantum fiziko ĝis alĥemio kaj spiriteco. Kelkaj el la plej fascinaj esploradoj temas pri formo kaj vibrado (cimatiko) kaj la kolektiva subkonscio.



Se vi interesiĝas ricevi bonan superrigardon de la temo, provu la libron CROP CIRCLES: Signs, Wonders & Mysteries (Agroglifoj: signoj, mirindaĵoj kaj misteroj). Ĝi provizas

bonan superrigardon de la temo el multaj anguloj kaj enhavas proksimume 280 kolorbildojn de la agroglifoj. Bonega okazo por ekscii pri la rondoj kaj la plej novaj pensoj kaj esploroj pri la rondoj estas ĉeesti unu el niaj interretaj kaj konferencaj eventoj. Ĝi ankaŭ estas bonega loko por renkonti samideanojn.

Kiam kaj kie ili aperas?

Kvankam povas ŝajni evidente, la agroglifo aperas nur dum la kresksezo de la greno. En Britio, la unuaj cirkloj povas komenci aperi en aprilo kaj majo kaj pinti fine de julio kaj aŭgusto. Agroglifoj efektive aperas tra la tuta mondo en multaj landoj kaj ŝajne ili simile sekvas la kresksezojn en tiu aparta parto de la mondo.

En Britio, la plej multaj cirkloj okazas en la distrikto de Wiltshire, kvankam cirkloj okazas (en pli malgrandaj nombroj) tra la lando. Dum la frua sezono (aprilo/majo) la nombroj estas malmultaj, sed tio iom post iom kreskas dum la somero progresas, ĉe la alteco de la sezono (fine julio/aŭgusto) pluraj cirkloj povas aperi en unu nokto. La sezono finiĝas kun la rikolto – kaj la ardezo estas purigita dum kroma jaro. La kultivaj cirkloj ŝajnas havi konekton kun restaĵo el antikvaj tempoj.

Multaj cirkloj aperas proksime de ŝtoncirkloj, tumuloj, teremparoj kaj aliaj apartaĵoj en la tereno. Stonehenge kaj Avebury havis multajn agroglifojn tra la jaroj. Agroglifoj kutime

mönstren, det har gjorts en del fascinerande forskning om geometrin och matematiken i grödcirkeldesignerna och formerna, vilket tyder på att mönstren inte är godtyckliga eller meningslösa, utan tvärtom.

Människor har kopplat cirklarna till ämnen så olika som stjärnkonstellationer och kvantfysik till alkemi och andlighet. En del av den mest fascinerande forskningen handlar om form och vibrationer (Cymatics) och det kollektiva omedvetna.

Om du är intresserad av att få en bra översikt över ämnet, prova boken CROP CIRCLES: Signs, Wonders & Mysteries. Den ger en bra överblick över motivet från många vinklar och innehåller cirka 280 färgbilder av beskärningscirklarna. Ett bra ställe att ta reda på om cirklarna och om det allra senaste tänkandet och forskningen om cirklarna är att delta i ett av våra online- och konferensevenemang. Det är också ett bra ställe att träffa likasinnade.

När och var uppträder de?

Även om det kan tyckas uppenbart, förekommer grödcirkeln endast under grödans växtsäsong. I Storbritannien kan de första cirklarna börja inträffa i april och maj och nå sin höjd i slutet av juli och augusti. Odlingscirklar förekommer faktiskt över hela världen i många länder och uppenbarligen följer de på samma sätt växtsäsongerna i just den delen av världen.

I Storbritannien förekommer de flesta cirklar i grevskapet Wiltshire, även om cirklar förekommer (i mindre antal) över hela landet. Under den tidiga säsongen (april/maj) är siffrorna få men detta byggs gradvis upp när sommaren går vidare, på säsongens höjd (slutet av juli/augusti) kan flera cirklar dyka upp på en natt. Säsongen avslutas med skörden – och skiffern torkas ren i ytterligare ett år. Odlingscirklarna verkar ha en affinitet för fornlämningar.

Många cirklar förekommer nära stencirklar, barrows, jordarbeten och andra landmärken. Stonehenge och Avebury har varit värd för många grödcirklar genom åren.

okazas dum la nokto, dum la malmultaj mallongaj horoj de mallumo dum la someraj monatoj. Plej multaj estas absolute perfektaj ĉe la unua lumo sen difektoj en siaj ŝablonoj!

Beskärningscirkla uppträder vanligtvis över natten, under de få korta timmarna av mörker under sommarmånaderna. De flesta är helt perfekta vid första ljuset utan brister i sina mönster!



Richard Meric

Intervjuo kun Doug Bower, kiu kun Dave Chorley inventis la fenomenon de agrolifoj (anglalingva video):

<https://www.youtube.com/watch?v=nfKArCWpKWE>

Intervju med Doug Bower, som med Dave Chorley uppfann fenomenet grödcirklar (video på engelska):

<https://www.youtube.com/watch?v=nfKArCWpKWE>

La plej malnova runŝtono malkovrita – Världens äldsta runsten upptäckt

kaj la persono, kiu malkovris la novaĵon kaj atentigis nin, estas nek norvego nek svedo – sed aŭstro – Walter Klag.

La verŝajne plej malnova runŝtono en la mondo estas malkovrita en Norvegio.

Ĝi estas preskaŭ 2 000 jarojn aĝa kaj tiel plurcent jarojn pli malnova ol antaŭe konataj

och personen, som hittade nyheten och uppmärksammade oss, är varken norrmann eller svensk – utan österrikare – Walter Klag.

I Norge har troligen den äldsta runstenen i världen upptäckts.

Den är nästan 2 000 år gammal och därmed flera hundra år äldre än tidigare kända

runŝtonoj, kiel la Kulturhistoria Muzeo en Oslo anoncis. La bloko de bruna grejso estis trovita en tomboloko malkovrita en la aŭtuno 2021. Ostaj kaj lignaj restaĵoj estis trovitaj en tombo apud la ŝtono, kies aĝo povus esti determinita per radiokarbonaj studoj, laŭ la muzeo. Tio indikas ke la runoj estis ĉizitaj en la ŝtonon en la jaroj 1 ĝis 250 p.K.



runstenar, vilket kulturhistoriska museet i Oslo meddelade. Blocket av brun sandsten hittades på en begravningsplats som upptäcktes hösten 2021. Ben- och trärester som hittades i en grav bredvid stenen, vars ålder kunde bestämmas med radiokolstudier, tyder enligt museet på att runorna huggits in i stenen under åren 1 till 250 e.Kr.

La malkovro ĉe la tombejo proksime de la lago Tyrifjorden, nordokcidente de Oslo, estas "revo plenumiĝanta por runologio" kiu esploras runajn alfabetojn, laŭ la muzeo.

La Tyrifjorden-ŝtono havas la surskribon "Idiberug", kiu verŝajne estis destinita por honori la mortinton, kiu poste estis entombigita en la tombomuzeo.

Ĝis nun, ŝtonoj trovitaj en Norvegio kaj Svedio de la jaroj 300 ĝis 400 p.K. estas konsiderataj kiel la plej malnovaj runaj ŝtonoj, diras fakulo Kristel Zilmer al la norvega novaĵagentejo NTB.

La trovaĵo ĉe Tyrifjorden estas do "unika malkovro". La ŝtono videblas de la 21-a de januaro ĝis la 26-a de februaro ĉe la Muzeo de Kultura Historio en Oslo.

Upptäckten vid gravfältet nära sjön Tyrifjorden, nordväst om Oslo, är "en dröm som går i uppfyllelse för runologer" som forskar om runalfabet, enligt museet

På Tyrifjordenstenen finns inskriptionen "Idiberug", som troligen var avsedd att hylla den avlidne som begravdes i grav-museet.

Hittills har stenar som hittats i Norge och Sverige från åren 300 till 400 e.Kr. ansetts vara de äldsta runstenarna, säger experten Kristel Zilmer till den norska nyhetsbyrån NTB.

Fyndet vid Tyrifjorden är därför en "unik upptäckt". Stenen kan ses från 21 januari till 26 februari på Kulturhistoriska museet i Oslo.

red, science.ORF.at/agentejoj

El sat.iro

esperanto@chello.at – Walter Klag sendis



La numenio – Storspoven

de Renate Säfström



I Morups Tånge med Renate Säfström

Solen skiner idag
och en droppe faller från
Storspovens långa näbb
Ett och annat litet kräftdjur
från den leriga havsbotten
slinker också ner.

Ĉe "Morups Tånge" kun Renate Säfström

La suno brilas hodiaŭ
kaj guto falas de
la longa beko de la granda numenio
Unu aŭ du malgrandaj krustacoj
de la kota marfundo
ankaŭ ŝteliras malsupren.



Storspoven drillar
En drill av melankoli
och med hopp om våren

La granda numenio trilas
Trilo de melankolio
kaj kun espero pri printempo

Åsa Rudehäll

Printempaj hajkoj

Paperpremioloj
sur libroj de strata librejo
– estas printempa vento hodiaŭ

Oni interrompis la konversacion
por pli bone rigardi
la vualitan lunon

Kitō

Chiyo-ni

Mia vojaĝo al Senegalo

de Espoir Ngoma Kasati

Post mia elekto kiel Asista Esperanto-instruisto, mi devis ekvojaĝi al Senegalo la 1-an de decembro 2022, sed mia vojaĝo ne estis tiel facila kiel antaŭvidita; akiri vizon iĝis tre atentokapta problemo. La senegala ambasado en Kinŝaso rifuzis doni al mi vizon dum tiam estis forir-tempo. Danke al energiaj klopodoj kaj engaĝiĝo de S-ro Jeremie SABYUMVA, estrarano de UEA pri Afriko, kaj s-ino Mireille Grosjean, ni trovis duan alternativon: akiri enirpermesilon tra la senegala ambasado en Kigalio/Ruando; feliĉe tiu ĉi dua alternativo sukcesis.



Espoir Ngoma Kasati flugas al Senegalo.

Prokrastinte la vojaĝ-daton kaj post akiro de la enirpermesilo, s-ino Mireille Grosjean aĉetis la flugbileton por mi por ekvojaĝi de Lusako/Zambio al Senegalo la 8-an de decembro 2022. Ŝi estis la peranto inter la Svisa Fonduso pri Malarmado kaj elektitaj instruistoj (mi kaj Vjatcheslav Ivanov).

La vojaĝo longdaŭris, ĉar mi devis vojaĝi de Lubumbashi (mia hejmurbo) al Lusako/Zambio de kie mi flugis al Dakaro/Senegalo. La vojaĝo estis tre longa de Lubumbashi al Lusako buse, mi restis tutan tagon de la 6a matene ĝis la 2a en la flughaveno atendante mian flugon. Mi dum tiu longega tempo estis sidanta, mi devis atendi en la flughaveno por ne maltrafi mian flugon. Ni flugis de Lusako al Adisabebo, de Adisabebo al Bamako kaj de tie al Senegalo.

La vojaĝo estis sufiĉe glata kvankam la unua fojo. Mi sekvis ĉiujn konsilojn donitajn de la stevardinoj – je mia granda avantaĝo, mi regas la anglan lingvon, angle multaj parolis en la aviadilo. Ĉiam mi emis okulumi tra aviadilfenestroj. Amuzis min vidi la nubojn apud ni, super ĉiuj urboj. La vojaĝo de Adisabebo al Bamako estis tro longa, mi

dormis sufiĉe, sed al mi doloris la kolo! Venis manĝaĵo, trinkaĵo, estis mojose!

Estis mia unua vojaĝo per aviadilo: mi sciis prie nenion, feliĉe la afablega S-ino Mireille Grosjean ĉiam akompanis min per konsiloj kion fari kaj kiel kondukti antaŭ eniadiĝi, en kaj ekster la aviadilo. Estis tre ĝojiga vojaĝo, eĉ multe pli valora, ĉar ne facilas je mia aĝo kaj laŭ financa ebleco vojaĝi aviadile; estis revo kiun realigi eble ne okazus, sed per Esperanto, jen mi atingis grandegan Etapon. En Afriko la peraviadila vojaĝo estas por riĉuloj, estas por mi granda honoro konatiĝi kun Esperanto kaj per ĝi travivi memorindajn momentojn.

Alveninte, min gastigis Sinjoroj Assane Faye (prezidanto de la Senegala Esperanto-Asocio) kaj Lafi Charles Diatta (prezidanto de la Senegala ILEI-sekcio); ili estis paciencaj pro mia malfruo en la flughaveno. Ili restis ekstere pro malpermeso eniri, bone armitaj soldatoj staris ĉe la flughaven-enirejo kaj ne akceptas iun ajn eniri se oni tie laboras. Ĉirkaŭ je la 19a horo mi eliris, ni faris filmeton pri mia alveno kaj ekveturis al Rufisko kie jam estis luprenita domo por mi. Mi devis eklabori sekvan tagon.

Ĉiuj honoroj iru al tiuj meritoplenaj gravaj homoj, kiuj ege laboris kaj daŭre laboras por la disvastiĝo de la movado en Afriko, nome: Mireille Grosjean, el Svisio movade laboranta por Afriko, kaj Jérémie SABIYUMVA, Estrarano de UEA pri Afriko.

Mi estas tre danka al ambaŭ homoj, ĉar estas sub ilia periodo, ke mi unuafoje realigas unu el miaj plej aspirataj rev-eroj kaj danke al ili mi povis viziti tre gravajn, historie riĉajn urbojn kaj landojn kaj havas grandan familion esperantistan en Senegalo.

Preparkursoj en Senegalo

Estas afrikama Mireille Grosjean kiu elpensis la projekton, kiu konsistis el preparkursoj en Senegalo antaŭ la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto. Oni serĉis unu instruiston, kiu iros al Senegalo por instrui Esperanton antaŭ la kongreso, kandidatiĝis 30 homoj. La ĵurio estis tuj starigita, ĝi povis aŭdi ĉiujn kandidatojn, kiel rege kaj mature ili regas la lingvon, kiom ili spertas pri la instruado. Post la unua prezentado, elektiĝis tri, sed la ĵurio devis kribri ĝis unu instruisto, tiu decido ŝajnis malfacila, tial finfine estis decidite preni du instruistojn, unu iru al Senegalo ekde oktobro 2022 kaj la alia postsekvos kiel asista instruisto kaj kune surloke organizu intensajn kursojn. Mi feliĉas, ke mi estis la dua! Kaj la unua estis Vjatcheslav Ivanov el Peterburgo/Ruslando.

La kursoj estis ege sukcesaj. Kiam mi alvenis, mi trovis surloke la lernantojn jam motivigitaj, la kursoj okazis en du malsamaj kluboj: unu en Rufisko kaj la alia en Dakaro, kio estis tre granda peno por Vjatcheslav Ivanov, sed brava, entuziasma kaj decida li estas, li ja sukcesis mastrumi la du klubojn.

La sekvan tagon mi iris al Dakaro por renkontiĝi kun tiea klubano kaj fizike renkontiĝi kun Vjatcheslav Ivanov, kiu estas vere nature afabla, bona homo, kunlaborema, havas belajn ideojn, antaŭen-

emajn iniciatojn por la Esperanto-kursoj. Mi ekĝuis la unuan tagon kun li. La unua tago estis tre mojosa, la varma gastigo estis akompanita de tradiciaj dancoj kaj la tradicia senegala plado: Tièp bou ginaar, ni kunfestis kaj kune pasigis agrablegan momenton.



Foto farita dum kunmanĝo.

Evoluo de la kursoj

La kursoj bone evoluis, okazis ekzercoj, diskutoj dumkursaj por paroligi la lernantojn, mi starigis demandetojn kiel: "kial vi trinkas teon ĉiumatene?", tiaj frazoj kondukis al debatetoj, nu, mi devis prepari tagan lecionon ĉiutage estante surloke. La lernantoj ne estis akurataj, tio estis tre malfacila por ni, ĉar en ĉiu kurso ĉeestis lernanto(j), kiuj ne ĉeestis pasintan lecionon, tial el iliaj diraĵoj dum la debatoj fontis tagaj lecionoj. Lun tagon, ĉeestis gesamideanoj venintaj al Senegalo por partopreni la kongreson el Kanariaj Insuloj/Hispanujo, temas pri Petra Severiano kaj Echedey Jorge. Ili ĉeestis miajn kursojn en Dakaro du fojojn kaj unufoje en Rufisko. En ĉiuj kluboj ĉiutage okazis kursoj, en Dakaro kaj en Rufisko. Mi ĝojis, ke inter mi kaj Vjatcheslav Ivanov regis frateca kunlaboro, ni respektis kune la alian kaj plej grava estas, ke ĉiu el ni ambaŭ admiris la kapablon de la alia: mi imagis, ke S-ro Ivanov ne antaŭpensis ke povas trovi junulon malpli ol 30-jaran kiu flue kaj rege parolas Esperanton. Li ĉiam volis paroli kun mi, same mi ŝategis ĉiun fojon kiam ni renkontiĝis, ĉar li ja primajstras la instruan karieron. Estis tia harmonio eĉ flanke de niaj lernantoj, ili ja amis nin.

Jen Ivanov el Ruslando kaj Esplor el Kongo (ĉe la muzeo: Musée des Civilisations Noires en Dakaro).



Antaŭ ol foriri al la kongresejo Petra Severiano kaj Echedey Jorge organizis festeton tiam post kurso, estis ja agrabla tago, ni tostis je la nia renkontiĝo kaj konatiĝo.



Petra Severiano kun la bonveniga festeto antaŭ Thierno BA.



Echedey Jorge, Esplor Ngoma Kasati kaj Petra Severiano (adiaŭa kunfotiĝo).

La preparkursoj estis sukcesaj kaj avantaĝoplenaj. La kongreso estis tre interesa ankaŭ danke al la ĉeestoj de niaj lernantoj, kiuj nun parolas Esperante, tiun sukceson ni ŝuldas al Mireille Grosjean, Jeremie SABIYUMVA, Lafi Charles Diatta kaj Assane Faye, ili faris tre grandan majstran laboron.



La du belaj viroj estas Charles Diatta kaj Assane Faye. La blanka virino estas Martina Sachs kaj la knabino estas nia lernanto.



S-ino Martina Sachs bonvenigas ĉiujn per afablaj vortoj.

La 8-a Afrika Kongreso de Esperanto

En lando de la "Teranga", vorto signifanta "Gastamon", okazis la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto en la urbo Tieso (Thiès). Lando kulture riĉa, plena je multegaj vidindaĵoj, kun popolo nature gastama kaj kie regas interreligia interkompreniĝo. Kun 55 partoprenantoj el Senegal, DR. Kongo, Togolando, Madagaskaro, Burundo, Tanzanio, Britio, Usono, Germanio, Italio, Francio, Brazilo, Hispanio, Islando.

La kongreso estis tre sukcesa. Mi alvenis ĉe la kongresejo la 26an de decembro 2022. Mi ludis tri rolojn: membro de la nova Afrika Komisiono de UEA, instruisto sendita de ILEI kaj surloke reprezentis la Tutmondan Esperantistan Junularan Organizon kiel komisiito pri Edukado kaj Komitatano B de tejo.

https://drive.google.com/file/d/1_rVuipOsq1ps1dkyCV-JxvhNwyTaNKh-/view?usp=share_link



En la vespero de la 26a de decembro 2022 estis alveno de ĉiuj senegalaj samideanoj, ni ĝojis renkontiĝi kune en Tostan-centro, la kongresejo. Regis ĝoja kakofonio, babiladoj, estis ja la interkona vespero.



Mana kun apude la gesamideanoj el Brazilo.

La malferma ceremonio estis ĝojiga, varma, okazis diverslandaj tradiciaj dancoj, poemoj, kantoj, estis ege mojosa tago, iru ĉe la ligilo sube por spekti la filmeton de la 8-a AKE.

Post dancoj, ni faris memfotiĝon, jen kiel belaj homoj ridetas kune en Senegal sur la bildo.

Dum la kongreso okazis multaj intereseĝaj prelegoj, programeroj, interŝanĝoj. Menciindas kelkaj, kiuj ja helpos al la venontaj kongresoj en Afriko:

Rakoen Maertens: Li prelegis pri Misinformado kaj disflugo de falsaj informoj. Li klarigis kiel falsaj informoj rapide disvolviĝas kaj estas rapide fidataj, akceptataj..., tiu prelego tute kongruis iasence kun tiu de sinjoro Andreas Emmerich el Germanio, kiu dum sia prelego asertis ke



Rakoen Maertens prelegas.

trafis lin informoj, ke en Afriko regas murdoj, danĝeraj malsanoj, sed kion li en Senegalio ne vidis. Li plurfoje planis veni en Afrikon sed nuligadis la vojaĝojn pro tiuj falsaj informoj koncerne Afrikon, kiuj jam disiĝis tra Eŭropo, Azio, Ameriko kaj Oceanio. Li spertiĝis kaj nun, certe li havas tute malan idean koncepton pri Afriko. Tio ĉi certigas, ke afrikaj kongresoj okazas en pacaj landoj, kie ĉiuj kongresanoj povas plene ĝuadi sian restadon kaj sufiĉe spiri puran aeron.



Andreas, klarigas pri kiom foje trafis lin falsa mensogoj pri Afriko.



Ni kunmanĝas Tièp bou dièn (senegala plado el rizo kaj fiŝo) post la ekzameno kun Martina.

La antaŭlasta tago

La antaŭlasta tago estis markita per du ĉefaj programeroj: Ekskursoj kaj Ekzamenoj.

Danke la la preparkursoj, ekzameniĝis 21 lernantoj, la plejmulto atingis la nivelon inter A2 kaj B1 aliaj atingis eĉ B2. La ekzamenajn aktivecojn plenumis S-roj Vjatcheslav Ivanov kaj mi akompanate de tre afabla sinjorino Martina Sachs.

La ekskursoj estis ege sukcesaj, unupartige ĝojiga kaj aliparte melankolia: la vizito ĉe roza lago estis plena je belaj ridetoj, sed la vizito sur insulo Goreo, kie estas la sklav-domo, estis tre morniga. Pro la praaĵaj historioj koncerne la koloniajn fiagojn, multaj estis profunde kortuŝitaj, aliaj eĉ ploris... La sklava vivo en ege etaj ĉambraĉoj, kondiĉoj kiujn travivis niaj prauloj nigraj, ne permesis fari longan prian artikolon, ĉar ruĝaj larmoj elfluantaj el la okuloj de la ekskursintoj, fermis ties buŝojn rankonti multe....



Antaŭ la ekiro al la ekskursoj, la bela viro antaŭ ĉiuj estas la ĉiĉerono kaj feliĉe parolas Esperanton, li estas la nevo de Assane Faye.



Echedey, Petra kaj Machelly ĉe la roza lago.

Ĉe la sklav-domo, la ĉiĉerono rakontas la historion.



Gravaj kongresaj rezultoj:

1) Jam ekde la komenco de miaj esperantaj kursoj en Rufisko, mi instigadis pri la neceso krei fortan vivantan junularan movadon en Senegalo. Tiun ideon mi nutrigadis eĉ dum la kongreso. Per la helpo de niaj iamaj tejo-anoj nome: Francesco Maurelli, Rakoen Maertens,

Koffitche KOUFIONOU, ni sukcesis starigi la Senegalan Esperantistan Junularon (SEJ), kiu nun klopodas aliĝi kiel Landa Sekcio de TEJO kaj estas progresaj elpaŝoj.

2) Virinoj renkontiĝis, estis grava momento paroli pri virina agado en Afriko kaj iamaniere pri la tuta mondo.



Virinoj post sia programero.

Gravaj personoj

Ekster la Afrika Komisiono, kelkaj personoj ludis gravan rolon por la sukceso de la kongreso, temas pri:

- a) **Adjévi Adje** el Togolando, li ege laboris dum la tuta kongreso, li kunordigis multajn programerojn.
- b) **Martina Sachs** el Germanio, ŝi ĉiam intervenis en diversaj aferoj, ŝi estis la patrino de la kongreso. Ŝi zorgis pri la tuta kongresanaro, ŝi alportadis kafon, akvon kaj eĉ zorgis ke la manĝoj estu akurataj. Zorgis pri diversaj dietoj, ĉiam demandis kiu forestas dum la kunmanĝo kaj eĉ post. Ŝi

ĉiam babiladis kun komencantoj por kuraĝigi ilin.

c) **Koffitche KOUFIONOU** el Togolando, ŝi intervenis en teknikaj aferoj, zorgis pri junuloj kaj per sia komputilo protokoladis. Li estis kongresa gravulo el Togolando.

d) **Jeremie SAYUMVA** kaj **Patrick MANIRAKIZA** el Burundo, ĉiam kunordis la kongresajn aferojn kaj forte enplektiĝis por la sukceso de la Kongreso.

e) **Francesco Maurelli** kaj **Sara**, ankaŭ multe helpis en la kongreso, intervenis en gravegaj programeroj.

f) **Magessa Magesa** el Tanzanio, **Ranja Lydie**, **Miora Raveloharison** el Malagasio, ĉiuj estis tre gravaj kaj kontribuis al la sukceso de la kongreso.

Lasta tago

Post la kongreso, ni ĉiuj enbusiĝis, ni kuniris urbon post urbo por akompani niajn senegalajn samideanojn al iliaj hejmoj. Kiam ĉiuj senegalaj samideanoj atingis siajn hejmojn, Francesco Maurelli decidis ke ni iru kune al Dakaro por mallonga promenado, kunmanĝo kaj atendu tie la novan jaron. Ni iris ĝis belega hotelo en la urbocentro, poste iris vespermanĝi en itala restoracio.



Lasta kunmanĝo en la itala restoracio.

Post la manĝo, ni ekvagadis tra la urbo kune dumnokte. Ni iris ĝis la monumento de la renaskiĝo, estis ja meznokte, ni, ĉiuj nesenagalaj afrikanoj havis flugon la 1-an de januaro 2023, do ni devis ripozi por ellitiĝi frumatene kaj ekiri al flughaveno... Je la 8a matene ni adiaŭis Senegalon kaj esperas revidi ĝin en la tre proksima estonto.



Szabolcs + Przemek Wierzbowski, korusa renkonto kun Bernard Bigonnet + Anne Le Bot, BEMI-Semajno de esperantlingvaj biciklistoj kun Olivier Buisson, Dediĉo de verkoj ktp ktp.

Bv viziti http://gresillon.org/spip.php?page=rubrique&id_rubrique=2&lang=eo por vidi la detalojn kaj plenumi la aliĝilon!

La vojaĝo reen estis glata, krom de Zambio ĝis Lubumbashi/Kongo DR, pluvegis tiam. Busoj forestis dume, mi devis alveni tre frue al Lubumbashi por komenci miajn universitatajn studadojn. Ja endis elspezi multe de la flughaveno ĝis la bushaltejo, de kie mi prenis buson ĝis Ĉingola kaj de Ĉingola taksion ĝis Kasumbalesa – kiaj intensaj ŝtopiĝoj survoje! Finfine mi alvenis hejmen la 2an de januaro 2023 je la 17a horo.



Jen mi antaŭ la monumento tiunokte.

Rezulto de mia vojaĝo surloke: pluraj homoj interesiĝas pri lernado de nia lingvo kaj jam iu preĝejo helpas varbi sian junularon pri la eklernado de Esperanto, espereble nelonge ni havos esperantistajn pastorojn en Lubumbashi.

Se vi volas kontakti min aŭ interesiĝas pri miaj agadoj, jen miaj adresoj:

Facebook: Kasati Espoir

Retpoŝto: espoirkasati@gmail.com

Vacapo kaj telegramo: (+243) 972 716 042

Poŝtadreso: BP:1023, Lubumbashi/DR. Kongo

Dankas al vi,

Espoir NGOMA KASATI

Esperanta kastelo Greziljono dum printempo 2023!

Riĉa programo, ekz. Multaktivecaj semajnfinoj kun akvarelo/natur-arto kaj Hatha-jogo/akvarelo, intensivaj kursoj kun Marion Quenut + Paweł Fischer-Kotowski + SZILVA

Szabolcs + Przemek Wierzbowski, korusa renkonto kun Bernard Bigonnet + Anne Le Bot, BEMI-Semajno de esperantlingvaj biciklistoj kun Olivier Buisson, Dediĉo de verkoj ktp ktp.

Bv viziti http://gresillon.org/spip.php?page=rubrique&id_rubrique=2&lang=eo por vidi la detalojn kaj plenumi la aliĝilon!

Kleopatro

de Ingegerd Granat



Artista imago de Kleopatro



Elizabeth Taylor kiel Kleopatro



Kleopatro la 7-a Thea Philopator naskiĝis en 69 a.K. kaj mortis la 12-an de aŭgusto 30 a.K.

Ŝi estis Reĝino de Egiptujo, la Ptolema Imperio kaj ĝia lasta reganto.

Ŝi estis la amantino de kaj Julio Cezaro kaj Marko Antonio.

Sabate la 12-an de novembro 2022, la gazeto Göteborgs-Posten skribas, ke lastatempe malkovrita tunelo ĉe Taposiris Magna povas esti indico por trovi la tombon de Kleopatro. La tunelo troviĝas 13 metrojn subtere kaj longas 1,3 kilometrojn. La arkeologoj kredas

ke tio povas esti la plej grava malkovro de la jarcento.

Sed kiu estis ĉi tiu Kleopatro, kiu estas portretita en teatroj, operoj kaj filmoj? Jes, tiu, kiu rakontas tion en ekscita maniero, estas Plutarko. Ni aŭskultu lin:

Plutarko rakontas:

Kiam Antonio estis kun sia armeo en Kilikio sur la suda marbordo de Malgranda Azio (nuntempa Turkio), li sendis vorton al Kleopatro por veni tien por respondi pri tio, ke ŝi helpis la murdintojn de Cezaro.

Ŝi nun atingis tiun altan punkton en la vivo de virino, kiam la plej riĉa florado de beleco

koincidas kun la plena matureco de la menso. Tial ŝi akiris pompajn donacojn kaj preparis sin por ĉiu okazo, sed antaŭ ĉio ŝi fidis sian propran magian potencon de sorĉado.

Ŝi veturis malstreĉite laŭ la rivero Kydnos en jaĥto kun orita posta steveno kaj purpuraj veloj; la remistoj takte movis siajn arĝentajn remilojn al orkestro de flutoj, paŝtistoj kaj citroj. Sub orbrodita sunombrelo sur la ferdeko ŝi mem kuŝis etendita, ornamita kiel Afrodito; knaboj vestitaj kiel kupidoj ventumis ŝin. Same, ŝiaj plej belaj ĉambristinoj estis kostumigitaj kiel sirenoj aŭ graciaj kaj ludis maristojn ĉe la stirilo kaj en la rigilaro. Mirinda aromo de ĉiaspeca incenso disvastiĝis ĉirkaŭ la ŝipo ĝis la bordoj de la riveroj.

Fakte, laŭ ĉeestintoj, la beleco de Kleopatro estis nek elstara nek blindiga, sed en kompanio ŝi estis nerezisteble alloga. Antonio nun estis tute en ŝiaj ungegoj. En Romo lia edzino Fulvia batalis kontraŭ Oktaviano por lia afero, ĉar la triumviroj komencis malkonsenti. Ĉe la limo en la oriento, la Granda Reĝo de la Partoj minacis. Sed Antonio estis for; li lasis sin treni en la sekvantaro de Kleopatro al Aleksandrio en Egiptujo, kie li evitis la devojn, same kiel lerneĵano, por sin indulgi en petoloj kaj gajeco kaj malŝpari tiun plej altvaloran el ĉiuj elspezoj, la tempon.

La disputo inter Oktaviano kaj Antonio plimalboniĝis. En la jaro 40, kiam lia edzino mortis, Antonio revenis al Romo kaj reedziĝis kun la fratino de Oktaviano, Octavia. Estis provo fliki la fendojn inter la du grandaj viroj. Sed jam la sekvan jaron, Antonio revenis al Kleopatro. Ĝi estis kruda insulto al kaj Oktaviano kaj lia fratino.

Iĝis eĉ pli malbona kiam Antonio komencis fordoni partojn de la Romia imperio al Kleopatro kaj ŝiaj infanoj. Antonio deklaris ke

la tri infanoj, kiujn li havis kun Kleopatro iĝus regantoj de la orientaj provincoj de la Romia imperio.

Nun la batalo temis pri pli ol la batalo inter du povomalsataj viroj. Ĝi koncernis ĉu la Romia imperio daŭre estos regita de Romo, aŭ ĉu la imperio estus regita de Aleksandrio en Egiptujo aŭ eble de alia grandurbo en la oriento.

Oktaviano kaj Agripo gajnis grandan venkon ĉe Aktio.

La batalo estas konsiderita unu el la plej signifaj en Eŭropa historio. La batalo por la Romia imperio finiĝis. Oktaviano venkis kaj Romo restis la ĉefurbo de la imperio.

Antonio ankoraŭ estis libera. Li kaj Kleopatro eskapis kune kun proksimume sepdek ŝipoj. Sed Antonio perdis sian armeon kaj ankaŭ sian reputacion. Li forlasis siajn soldatojn, kio kaŭzis preskaŭ ĉiujn romanojn turniĝi kontraŭ li. Antonio elektis partion kiam li fuĝis kun Kleopatro.

Kleopatro vidis ĉion kiel venkon. Por ŝi la fuĝo estis triumfo kaj ŝi lasis siajn ŝipojn veli en Aleksandriion ŝarĝitajn per floroj. Antonio estis pli malgaja – li sciis, ke li kondukis malkuraĝe kaj malmorale.

Antonio kaj Kleopatro havis nenion por fari krom atendi la verdikton. Oktaviano ne rezignis ĝis liaj malamikoj estis mortaj aŭ kaptitaj.



Nun ni denove aŭskultas Plutarkon:

Antonio kriis, ke Kleopatro lin perfidis. Ŝi fuĝis al la tomboĉambro kaj sendis vorton al Antonio ke ŝi estas morta. Li kredis la ordonon kaj diris al si:

– Kial vi prokrastas, Antonio? La sorto forigis la solan kialon, kiu restis al vi por teni la vivon.

Antonio havis fidelan sklavon nomitan Eroso, kiu promesis mortigi sian majstron se li petos. Eroso eltiris sian glavon kaj mezuris, sed kiam Antonio deturnis sian vizaĝon, la sklavo mortigis sin mem.

Tiam Antonio diris:

– Bone farite, Eroso! Kion vi ne povis, vi instruas min fari!

Dirinte tion li enpuŝis la glavon en sian ventron kaj falis planken. Sed la efiko ne estis tuj mortiga. Kiam la sangofluo ĉesis, li petis la ĉeestantojn doni al li la mortigan baton de kompatato. Sed ili fuĝis el la ĉambro. Do li kuŝis ĝis Kleopatro transportigis lin al sia tomboĉambro.

Tiam li eksciis, ke ŝi ankoraŭ vivis. Ŝi aperis en fenestra aperturo, de kie ŝi mallevis ŝnurojn kaj ŝtofon por leviĝi. Do ŝi levis lin kun la helpo de du knabinoj, la solaj, kiujn ŝi venigis en la tomboĉambron. Pli malĝoja vidaĵo neniam estis vidita, ĉeestintoj diras. Sange sanktoleita kaj en malfacila

mortbatalo, li estis transportita supren. Ne estis facila laboro por virino, sed ŝi tiris per ambaŭ manoj, tiris kun decida mieno.

Post kiam ŝi kuŝigis lin sur liton, ŝi ŝiris siajn vestojn pro malĝojo, batis la frunton kaj gratis siajn vangojn. Antonio interrompis ŝian lamentadon kaj admonis ŝin aranĝi sian propran savon. Koncerne lin mem, oni laŭdu lin feliĉa pro la tuta bono kaj plezuro, kiun li jam spertis, lin, kiu akiris superhomajn honoron kaj potencon kaj nun povus esti venkita nur de Romano.


Kleopatro sekvas Antonion

Ĝuste kiam lia vivo fuĝis, vorto venis de Oktaviano. Kleopatro estis rakontita ke li iros al Sirio, sed ke li decidis sendi ŝin kaj ŝiajn infanojn rekte al Romo. Kleopatro petis sian permeson unue fari oferojn ĉe la tombo de Antonio. Li konsentis, kaj ŝi kovris la tumulon per florkronoj kaj signoj de amo.

Tiam alvenis mesaĝisto kun skatolo por ŝi. Kiam la gardistoj volis scii, kion la viro havis kun si, li malfermis la skatolon, levis tavolon da figaj folioj kaj montris, ke ĝi estas plena de figoj.

Dume, Kleopatro sendis leteron al Oktaviano, forsendis ĉiujn servistojn krom la du intimaj knabinoj, kaj enŝlosis sin.

Tuj kiam Oktaviano legis la leteron kaj trovis, ke ŝi ordonis al li enterigi ŝin apud Antonio, li komprenis kio okazis. Liaj senditoj venis en



plena galopo, trovis la gardistojn nenion rimarkintaj, kreve malfermis la pordojn kaj trovis Kleopatron morta, etendita sur ora kanapo en reĝaj regosimboloj. El la knabinoj, unu, Eiras estis ŝia nomo, kuŝis mortanta ĉe la piedoj de la reĝino, dum Kharmion, jam ŝanceliĝanta kaj konsternita, alĝustigis la diademon sur la kapo de la mortinto.

Unu el la gardistoj kolere ekkriis:

– Tio estis bela afero, Kharmion!

– Jes, ŝi respondis, bela kaj inda posteulo de multaj reĝoj. Ŝi ne diris plu; en la sama momento ŝi falis apud la sofon.

Oni kredas, ke la serpento estis kontrabandita kun la fruktoj, kaŝitaj inter la figfolioj. Koncerne Oktavianon, li koleris pri la morto de Kleopatro sed admiris ŝian noblan

menson. Li havis ŝian polvon entombigita kun reĝaj honoroj apud Antonio. La knabinoj ankaŭ ricevis honoran entombigon laŭ liaj ordoj.


Kiom da ĉi tiu romantika fino estas vera, ni ne scias. Povas esti, ke Plutarko aldonis kelkajn detalojn por fari la rakonton pli ekscita. En modernaj historiaj libroj oni kutime nur mencias ke Antonio faris memmortigon ponardante sin en la stomako kaj ke Kleopatro prenis sian vivon permesante al si esti mordita per serpento. Sendepende de kiu versio estas vera, oni plej verŝajne konsentus, ke la rakonto de Plutarko estas la plej interesa.

La eltiraĵoj de la rakontoj de Plutarko estas bazitaj sur traduko farita fare de Ivar Harrie, levandehistoria.se

Fama piedpilkisto rekomendas Esperanton

el Interreto

Ĉu vi scias, kiun oni opinias la plej bona piedpilkisto de la dudeka jarcento? Lia nomo estas Edson Arantes do Nascimento, kaj la Monda Asocio de Piedpilkado donis al li tiun titolon en 1999. Li ricevis preskaŭ tri kvaronojn el ĉiuj voĉdonoj!



Kial tiom da homoj konsideras lin tiel elstara piedpilkisto? Nu, li trifoje en sia vivo gajnis la mondan pokalon de piedpilkado por sia lando, Brazilo. La unuan fojon li estis nur 17-jara! Neniu alia faris tiom da goloj en sia kariero kiom faris Edson; li faris 1283 en 1363 matĉoj! La plej bonaj nuntempaj piedpilkistoj (Cristiano Ronaldo kaj Lionel Messi) faris nur po proksimume 700.

La „Reĝo de la futbalo“ apogas esperanton



O Esperanto será muito útil
aos sportistas em geral para
aproximá-los e facilitar-lhes
as relações de amizade e depor-
tivas.

Carlos Alberto Pelé

Santos, agosto. — Je la nomo de IOE mi sukcesis intervui la plej faman sportiston de nia tempo, la brazilan futbaliston Pelé, kaj ankaŭ la kapitanon de la brazila ĉefteamo, Carlos Alberto.

Ili ambaŭ decidis plene apogi nian kampanjon „ESPERANTO EN LA SPORTOJN“. Por konfirmi tion, ili ambaŭ subskribis deklaron manskribitan de Pelé mem, en la portugala lingvo, kiu en traduko tekstas: „ESPERANTO ESTOS TRE UTILA AL LA SPORTISTOJ ĜENERALE POR ILIN ALPROKSIMIGI KAJ FACILIGI AL ILI LA INTERRILATOJN AMIKAJN KAJ SPORTAJN“. Subskribis Carlos Alberto (la kapitano) kaj Edson — Pelé (la „reĝo“).

La mondfama sportisto ankaŭ donacis al ni sian foton, sur kiun li skribis: „Kun ĉirkaŭbrako de Edson — Pelé“.

Ili ambaŭ permesis al ni uzi la deklaron kaj la foton en nia kampanjo inter sportistoj.

F. S. Almada

ESPERANTO-GAZETO n-ro 42 (V/7)

SPORTO KAJ ESPERANTO

Demanditaj pri la premeĝa problemo de sporto kaj mond-lingvo, Pelé kaj la kapitano de la Brazilia Selektitaro, Karlo Alberto, opiniis, ke „ESPERANTO ESTOS TRE UTILA AL LA SPORTISTOJ ĜENERALE POR ILIN ALPROKSIMIGI KAJ FACILIGI AL ILI LA INTERRILATOJN DE AMIKECO KAJ SPORTO“.

Pelé aparte esprimis sian deziron lerni Esperanton.

Vi supozeble tamen ne rekonas lian nomon. Kiel povas esti, ke la plej faman el ĉiuj piedpilkistoj vi ne konas? Nu, en Brazilo, kie naskiĝis Edson la 23-an de oktobro 1940, oni tre ofte ricevas karesnomon en sia junaĝo, kiun oni poste uzos dum la tuta vivo. Tio okazis al Edson, tiel ke neniu scias lian veran nomon: ĉiuj nomas lin **Pelé!**

En la jaro 1970, Pelé kaj Brazilo trian fojon gajnis la mondan pokalon, kaj oni nomis Pelé „La reĝo de piedpilkado“. Li verkis libron pri si mem kaj sia vivo, kaj en 1971 oni tradukis ĝin en Esperanton. La libro nomiĝas *Mi estas Pelé*.

En la libro oni povas legi mesaĝon pri Esperanto, kiun Pelé skribis en la portugala: „Esperanto estos tre utila al la sportistoj ĝenerale.“

Li aldonis, ke per Esperanto, la sportistoj pli proksimiĝos unu al la aliaj, kaj parolos kiel amikoj.

Estas mirinde, ĉu ne, ke la plej bona piedpilkisto de la lasta jarcento diris, ke li subtenas Esperanton! Ĉu vi povus imagi, kiel oni reagas, se Ronaldo aŭ Messi dirus la saman aferon hodiaŭ?


Tim Owen

Tim Owen estas brita esperantisto, kiu verkis tiun ĉi artikoleon okaze de la 80-a naskiĝdatreveno de Pelé, ĉar li multe respektas lin kiel piedpilkiston kaj kiel homon.

Aŭskultu Esperanto-kantojn – kaj kunkantu!

Torben Svendsen, Danio, atentigis nin pri bona ligilo.


Per ĉi tiu ligilo vi povus aŭskulti plurajn esperantajn kantojn: *Ni perdis la liberecon*, *Ho mia kor'* k.t.p. – YouTube: <https://www.youtube.com/watch?v=IYjB8lRvmjo>



Oliver Tzaut kantas: Ni perdis liberecon
(cigana rusa popolkanto/R. Seidel)

Sage flugas la viv'
Laŭ la tempa dekliv'
Kaj ĝi naskas kanzonojn pri ama jun'
Pri la noktoj sen dorm'
Pri la amoj sen dorn'
Pri la morto, l' feliĉo, la penta pun'

[Rekantaĵo]



Sed ni perdis liberecon
Sufokiĝis nia korkanzon'
La cigano svenis en forgeson
Kune kun gitara son'
Sed ni perdis liberecon
Sufokiĝis nia korkanzon'
La cigano svenis en forgeson
Kune kun gitara son'.

Oliver Tzaut, estas jud-devena franca instruisto, muzikisto kaj Esperantisto. Li estas konata pro sia muziko kun kantoj en diversaj lingvoj ekz. la Jida, Franca kaj Esperanto.

Li loĝas en Svislando kaj estas unu el la ankoraŭ vivantaj fondintoj de Kultura Centro Esperantista, kiu staras en la urbo La Chaux-de-Fonds.

Aŭskultu prezentadon pri Lorenaj Fabeloj!

Lorenaj Fabeloj – YouTube:

<https://www.youtube.com/watch?v=8KWkN7ifxPA>

La rakontisto tre klare elparolas Esperanton. Vi ne maltrafos eĉ unu vorton.

Triminuta komento pri la libro "Lorenaj Fabeloj", kolekto de fabeloj el la regiono inter Germanujo kaj Francujo, kunmetita de Angelika Merkelbach-Pink, Esperantigita de Benoît Philippe kaj ilustrita de Pavel Rak. Eldonis Kava-Pech.




Interŝanĝo de libroj

Antoni el Hispanio trovis la liston de esperantolibroj de la Stannum-biblioteko, sur nia retpaĝo

www.esperanto-gbg.org

Ni interkonsentis pri interŝanĝo de libroj. Ni sendis la libron "Telepatio" kaj ricevis "Mallongeco de la vivo". La libro enhavas 103 paĝojn kaj estas skribita en la latina kaj en Esperanto.



Mi memoras la lecionojn pri la latina en la Per Brahe gimnazio en Jönköping. Malgraŭ ke mi trovis la latinan malfacila lingvo, mi faŝinigiĝis de la tekstoj. Ili temis pri milito, filozofio aŭ amo. Ankoraŭ mi memoras la komencon de "Pyramus et Tisbe", amrakonton kiel "Romeo

kaj Julieta". Alia temis pri provo okupi la urbon Kartago, kiam elefantoj estis uzataj por timigi la malamikojn.

Jen teksto de la unua parto de la libro. Vi trovos la similecojn de la du lingvoj: /Siv



Latina teksto – De brevitae vitæ

Major pars mortalium, Pauline, de naturae malignitate, conqueritur, qvod in exiguum aevi gignimur, qvod haec tam uelociter, tam rapide dati nobis temporis spatia decurrunt, adeo ut exceptis admodum paucis ceteros in ipso uitae adparatu uita destituat nec huic publico, ut opinantur, malo turba tantum et imprudens uolgius ingemuit, clarorum quoque uirorum hic adfectus querellas eucauit: inde illa maximi medicorum exclamatio est: uitam breuem esse, longam artem inde Aristotelis cum rerum natura exigentis minime conueniens sapienti uiro lis: aetatis illam animalibus tantum indulsisse, ut quina aut dena secula educerent homini in tam multa ac magna genito tanto ceteriorem terminum stare....

Esperanto – Mallongeco de la Vivo

La plimulto de la mortemuloj, Paŭlino, plendas pri la malica naturo, ĉar ni naskiĝis por tiel mallonge, tiel haste, tiel rapide ni trakuras la tempan spacon, kiun ni ricevis, tiel ke, kun escepto de nur ege malmultaj, la vivo forlasas la ceterajn homojn jam meze de ilia pretiĝado por vivi. Kaj pro tiu ĉi – kiel oni diras – "publika malfeliĉo" ekĝemas ne nur la granda amaso kaj la multaj sencerbuloj, sed tiu konstato ankaŭ elvokas plendojn de tre eminentaj homoj. De tio devenas la konata ekkrio de la plej fama kuracisto: "mallonga estas la vivo, longa la arto". De tio ĉe Aristolelo, en malkonkordo kun la naturo, la sekva diro, kiu estas malkunvena en la buŝo de saĝulo: "al bestoj <la naturo> malenvias tiom da tempo, ke kvinan aŭ dekan generacion ili eduku, sed al la homo, kiu naskiĝis por tiel multaj kaj grandaj aferoj, ĝi atribuas templimon pli striktan".

Akompanu Ragnhild Hallén – Följ med Ragnhild Hallén

pastro en la Sveda Preĝejo, dum ŝi vagas tra siaj infanaj memoroj en Linnéstaden...

Mi faris nostalgian promenadon en la Linné-kaj Kastela Arbaro! Ni loĝis ĉe Rosengatan 5 b nur 3 jarojn! Tio sentis kiel eterneco! Eble ĉar la tagoj estis plenaj de ekscitaj aferoj! Ludlernejo, komenco de lernejo, promenoj en la Kastela Arbaro, sledi vintre! Iris al ritma baleto, ludis pianon, iris sole per tramo tien! Dimanĉa lernejo ktp.

präst i Svenska Kyrkan när hon vandrar i sina barndomsminnen i Linnéstaden...

Jag gjorde en nostalgisk vandring i Linné- och Slottsskogen! Vi bodde på Rosengatan 5 b bara i 3 år! Kändes då som en evighet! Kanske för att dagarna fylldes med spännande saker! Lekskola, skolstart, promenader i Slottsskogen, åkte kälke på vintern! Gick på rytmikbalett, spelade piano, åkte ensam med spårvagn dit! Söndagskola m.m.



Agrablege kun floroj kaj eŭkalipto-odoro!
Linnégatan

Härligt med blommor och eukalyptusdoft!
Linnégatan

Meze de la Linné-distrikto! Maldekstre Landsväggsgatan, dekstre Linnégatan!

Mitt i Linné-området! Till vänster Landsväggsgatan, till höger Linnégatan!



La nomo Landsväggsgatan estis establita en 1849 kaj konfirmita en 1852. Kune kun dek aliaj stratoj, Landsväggsgatan estas unu el la plej malnovaj en Haga, kun origino de 1798.

Namnet Landsväggsgatan fastställdes 1849 och bekräftades 1852. Tillsammans med tio andra gator, tillhör Landsväggsgatan de allra äldsta i Haga, med sitt ursprung från 1798.



La ŝtuparoj, Övre Djupedalsgatan!

Trapporna, Övre Djupedalsgatan!



Övre Djupedalsgatan, pordego meze de la ŝtuparoj!

Övre Djupedalsgatan, en port mitt i trapporna upp!



Nordhemsskolan ligger majestätisk! Byggd stadigt på berggrund!

Byggnaden i nationalromantisk stil på Kråkestadsberget eller Stora Lageråsen vid Nordhemsgatan 51 stod klar i december 1916, och den 30 maj 1917 skedde invigningen i närvaro av biskop Edvard Herman Rodhe, överdirektören i Skolöverstyrelsen, B. J-son Bergqvist och stadens ledande myndighetspersoner. Skolan hade då kostat 1 138 000 kronor att uppföra, och var därmed Göteborgs första miljonbygge.

Nordhemsskolan situas majeste!
Konstruita firme sur praroko!

La konstruaĵo en Nacia romantika stilo sur "Kråkestadsberget" aŭ "Stora Lageråsen" ĉe "Nordhemsgatan 51" estis kompletigita en decembro 1916, kaj la 30-an de majo 1917, la inaŭguro okazis en la ĉeesto de episkopo Edvard Herman Rodhe, la Ĝenerala direktoro de la Estraro de edukado, B. J-son Bergqvist kaj la gvidaj aŭtoritatoj de la urbo. La lernejo tiam kostis 1 138 000 kronojn por konstrui, kaj estis tiel la unua milion-konstruaĵo de Gotenburgo.



Ne aspektas tiel kruta kiel ĝi fakte estas! Dekstre estis sukeraĵejo! Danĝere proksime al la lernejo! Nordhemsgatan

Ser inte så brant ut som i verkligheten! Till höger låg en godisaffär! Farligt nära skolan! Nordhemsgatan

La lerneja korto, kiun oni memoras!
"Nordhemsskolan"!

La ludoj do? Ludi globetojn, salti ŝnuron aŭ pilkludoj aŭ...

Kiajn ludojn vi ludis kiel infano?



Skolgården man minns! Nordhemsskolan!

Lekarna då? Spela kula, hoppa hopprep, eller bollspel eller ...

Vilka lekar lekte ni som barn?



Belaj fasadoj sur "Nordhemsgatan"!

Fina fasader på Nordhemsgatan!

La Blanka Domo iom speciala! Mi salutis iun tiel!

Vita huset lite speciellt! Jag hälsade på nån där!



Olivedalsgatan kie loĝis la sinjorino de la antaŭlernejo, onklino Lizzie!

Olivedalsgatan där lekskolans tant Lizzie bodde!



La domo de "Rosengatan" kontraŭ "Alfhemsgatan"! Oni povas vidi evidentajn difektojn en la fasado pro grundmoviĝoj!

Rosengatans hus mot Alfhemsgatan! Man ser tydliga sättningar!

La enirejo ankoraŭ estas la sama, Rosengatan 5b.

Entrén sig lik, Rosengatan 5b.



Post la angulo estas la multaj restoracioj kaj vicoj da butikoj de Linnéstaden, dum la verda areo de Slottsskogen troviĝas sur la alia flanko de la strato.

Runt hörnet ligger Linnéstadens digra restaurang- och butiksutbud, medan Slottsskogens grönområde finns på andra sidan gatan.

Rosengatan malsupren direkte al Linnéplatsen.

La ejo estis aranĝita ĉirkaŭ 1890 por ligi Gotenburgon kun la Kastela Arbaro kaj estis nomita en 1894. Ĉi tie kutimis esti la tielnomita "Slottsskogsledet". La ejo estas ĉirkaŭ 65 metroj en norda/suda direkto, kaj ĉirkaŭ 125 metroj en orienta/okcidenta direkto kiam ĝi etendiĝas la tutan vojon al la "Dag Hammarskjöldsleden". Laŭ la urboplano, (1877) la cirkla ejo mezuris 85 metrojn.

Linnéplatsen estas atingebla per Rosengatan, Övre Husargatan, Konstepidemins väg kaj Dag Hammarskjöldsleden.

Ludlernejo, ankoraŭ antaŭlernejo!
Lekskolan, fortfarande förskola!

Vi povas preskaŭ vidi lin staranta tie pensante, la Julkoboldo, cerbumante pri la infanoj, kiuj venas kaj iras en eterna procesio...

... pripensas, kvankam ne multe helpas, strangan enigmon.
ne, mi ne komprenas ĉi tion –
ne, tiu enigmo estas tro malfacila forĵetas baldaŭ, kiel li kutime faras, tiajn demandajn pensojn,
ne, tiu enigmo estas tro malfacila...



La Naturhistoria muzeo sur la altaĵo! Kian ludejon ni havis! Iun vintran vesperon, iu skidklubo kun torĉoj en la manoj iris malrapide malsupren!

Naturhistoriska museet på höjden! Vilken lekpark vi hade! Nån vinterkväll åkte nån skidklubb med facklor i händerna sakta nedför!

Rosengatan ner mot Linnéplatsen.

Platsen anlades omkring år 1890 för att förbinda Göteborg med Slottsskogen och fick sitt namn 1894. Här låg tidigare det så kallade "Slottsskogsledet". Platsen är cirka 65 meter i nord/sydlig riktning, och cirka 125 meter i öst/västlig riktning då den sträcker sig ända fram till Dag Hammarskjöldsleden. Enligt 1877 års stadsplan mätte den cirkelrunda platsen 85 meter.

Linnéplatsen nås via Rosengatan, Övre Husargatan, Konstepidemins väg och Dag Hammarskjöldsleden.



Man kan nästan se honom stå där och fundera, Tomten, som undrar över barnen som kommer och går i ett evigt följe ...

... grubblar, fast ej det lär båta,
över en underlig gåta.
nej, jag gissar ej detta –
nej, den gåtan är alltför svår
slår, som han plägar, inom kort
slika spörjande tankar bort,
nej, den gåtan är alltför svår ...

La Naturhistoria muzeo de Gotenburgo estas la plej malnova muzeo de Gotenburgo. Ĝi estis establita en 1833 kun la naturaj kolektoj de la Reĝa societo por literaturo kaj scienco kiel bazo. En 1923, la muzeo translokiĝis de la "Ostindiska huset" (Orientinda domo) al sia propra lastatempe konstruita konstruaĵo en Slottsskogen, kaj en 1981 ricevis kromkonstruaĵon kun ekspoziciejoj kaj laborejoj.

La kolektoj de la muzeo inkludas ĉirkaŭ 10 milionojn da bestoj, kaj la konstanta ekspozicio montras larĝan elekton de la faŭno de la Tero – de unuĉelaj amebaj ĝis la fiera afrika elefanto, kiu sidas tronigita en la centro de la mamulhalo.

Kaŝtanoj estis volonte plukitaj!
Tiu, kiu povas vidi la grandan en la malgranda, estas feliĉa...

*Kastanjer plockades gärna!
Den som kan se det stora i det lilla är lycklig...*



Nun vi povas sidiĝi kaj paroli kun kunhomo.

Nu kan man sitta ner och prata med nån medmänniska.

Göteborgs naturhistoriska museum är Göteborgs äldsta museum. Det bildades 1833 med Kungliga Vetenskaps- och Vitterhetssamhällets naturaliesamlingar som grund. Museet flyttade 1923 från Ostindiska huset till en egen nyuppförd byggnad i Slottsskogen och fick 1981 en tillbyggnad med utställningslokaler och verkstäder.

Museets samlingar omfattar cirka 10 miljoner djur och den permanenta utställningen uppvisar ett brett urval av jordens fauna – från encelliga amöbor till den stolta afrikanska elefant som tronar i däggdjursalens mitt.



La deklivo, kie oni veturis per sledo kaj sidteleroj.

Backen där det åktes kälke och tefat.



Ŝanĝi vorton aŭ du
faciligis marŝi.
Renkontiĝo de ĉiuj homoj
devus esti tia.

El la poemo "Människors möte" de
Hjalmar Gullberg.

*Byta ett ord eller två
gjorde det lätt att gå.
Alla människors möte
borde vara så.*

*Ur dikten "Människors möte" av
Hjalmar Gullberg.*



La malgranda lageto! Jen ni
nutris anasojn!

*Lilla dammen! Här matade vi
änder!*

Kiam la suno brilas en la parko kaj la anasoj
venas naĝante al vi, povas esti tente nutri ilin
per partetoj de pano kaj ĵeti la panpecetojn al
la glutemaj birdoj.

Multaj ne faras tion ĉar ili kredas, ke la pano
ŝvelas en la stomako kaj la birdoj mortas
doloran morton.

Tio estas mito. Ĝenerale, birdoj tute bone
manĝas sekan manĝaĵon kaj toleras ĝin. Alie,
same malbone estus kun ĉio alia, kio estas
seka, diras Lotta Berg, profesoro de la Sveda
Universitato de Agrikulturo (SLU) kaj
prezidanto de Birdlife Sweden (antaŭe la
ornitologia asocio de Svedio).

**Ingegerd kompletigis per kuriozaj tekstoj pri
Gotenburgo.**

När solen skiner i parken och änderna
kommer simmande mot dig kan det vara
lockande att mata dem med delar av en
brödlimpa och kasta smulorna mot de
glupska fåglarna.

Många gör inte detta eftersom de tror att
brödet sväller i magsäcken och fåglarna dör
en plågsam död.

Detta är en myt. Generellt klarar fåglar
alldeles utmärkt att äta torr föda och kan
hantera det. Annars vore det lika illa med allt
annat som är torrt, säger Lotta Berg,
professor vid Sveriges Lantbruksuniversitet
(SLU) och ordförande i Birdlife Sverige
(tidigare Sveriges ornitologiska förening).

**Ingegerd har kompletterat med
kuriosatexter om Göteborg.**